

ILONA KOUTNY  
Hungario Pollando

Mia agado dum la lastaj 30 jaroj estis dedikxata al la *akademia* en la vasta senco de la vorto.

\* cx. 10 jaroj da instruado (1986-95) en la *Esperanto-fako de ELTE* (Budapesxto: esperanto-lingvo kaj -lingvistiko krom komputa lingvistiko), ankaux kreo de la internacia esperantologia fako;

\* poste fondo kaj instruado (ekde 1998) en la internaciaj *postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj en UAM* (Poznano: lingvistikaj studobjektoj kaj komunikado, krom la hungara fako):

nun la 6a interlingvistika grupo estas en la 2a jaro de siaj 3-jaraj studoj.

mi gvidis multajn diplomlaboraĵojn pri esperantologiaj temoj

La Studoj donis eblecon kunlaborigi ankaux aliajn universitatanojn, akademianojn.

\* mi gvidis anglalingvan *kurson pri interlingvistiko* kun kolego Michael Farris por gestudentoj de la Lingvistika instituto de UAM kaj Erasmus-studentoj (2008-2013);

\* de tempo al tempo mi instruis ankaux esperanton

\* nun mi koncentrigxas al *doktora formado*: mia unua doktorigxantino pri interlingvistiko baldaux defendos sian disertajxon. Du aliaj pretigxas.

en tiu cxi studjaro mi gvidas kurson pri interlingvistiko por doktorigxantoj de la Novfilologia Fakultato.

\* mi *prelegis* pri diversaj esperantologiaj temoj dum internaciaj kaj landaj konferencoj (ankaux ne-esperantistaj) kaj *aperigis artikolojn* pri tiaj temoj en diversaj lingvoj (esperante, hungare, angle, germane, france, pole).

\* verkis vortarojn kaj de 2010 *kunredaktas la lingvistikan revuon JKI* de la Lingvistika Instituto de UAM, kie povas aperi ankaux interlingvistikaj artikoloj.

\* organizis konferencojn: jam 3 *interlingvistikajn simpoziojn* en UAM (2008, 2011, 2014 - la lasta malfermita ankaux al ne-esperantistoj).

Miaj proksimaj planoj: kompilo de studlibroj por la Studoj kaj daurigo de la temvortara projekto.